

Komunumo Whiteway kaj Gassy Marin

Kio estas Whiteway?

(Ŭajtŭej) Signifas "blanka vojo"

Komunumo - "Kolonio" laŭ difino 6 (el 9) en PIV


Ĉirkaŭ 70 loĝejoj nun

16 hektaroj - 41 akroj

Neniu individuo rajtas posedi terenon

Laŭ polico kaj MI5 (ĉirkaŭ 1900) - "Loĝloko de stranguloj, socialistoj, komunistoj ..."

Kie estas Whiteway?



Origino de Whiteway

Fondita 1898 - Samuel Veale Bracher

Fondita de Anarkistoj ktp - por vivi simple kaj juste influitaj de la ideoj de Tolstoj

Teren-dokumentoj forbruligitaj por ideologiaj kialoj, kaj ankaŭ por malebligi forvendon de ajna parto de la kolonio kio estas komuna posedaĵo.

Komence ĉirkaŭ 17 loĝejoj

Komunuma Kunveno decidas kiu rajtas okupi terenon

Sekvis rakonton pri frua ano kiu volis viziti publikiston dum vintro, sed estis tiel malriĉa ke li posedis nek ŝuojn nek taŭgajn vestaĵojn. Liaj piedoj frost-difektiĝis kaj li devis reveni.

Evoluo

"Komunista" viv-stilo

Kontraŭ la rajto okupi terenon, ĉiu devis prizorgi la propran terenon, kaj helpi en komunaj laboroj.

Ne ĉiuj faris kio kaŭzis disputojn dum la komunumaj kunvenoj.

Interŝanĝoj estis permesataj kaj relative oftaj - eble iu konstruas/riparas kaj la alia faris ties taskojn.

Gastoj ĝenerale ne kontribuis, malgraŭ evidenta malriĉeco kaj limigitaj stokoj de manĝaĵoj - Senpaga gastigado ĉesis.

Domoj

Lignaj - Hipotekoj ne eblis ĉar oni ne posedis terenon kaj daŭra loĝado dependis de decidoj de la komunumaj kunvenoj.

La kunvenoj rajtis ekzigi anojn kiuj ne plenumas siajn devojn aŭ kiu post sufiĉaj avertoj daŭris miskonduti.

[mapo kaj pluraj bildoj]

Ĉirkaŭaĵoj [pluraj bildoj]

Gassy Marin

Naskiĝis Bruselo 1883 okt 06

Patrino Alice Marin - (angla)

Esperantiĝis 1899 - estis fervora Esperantisto, sed ne trudis sur tiuj kiuj ne interesiĝis.

Li partoprenis en Belgaj kolonioj anarkistaj de 1904-1907 (fermis)

Trajtoj

Modesta, honesta, pacifisto, - amiko de infanoj kaj simpluloj - vegetarano, nefumanto, Anarkiisto

libereco en pensado, parolado, kaj agado

Antropologo

Patro laboris por riĉuloj donacis monon al Gassy kondiĉe ke li ne altiru publicon (kio damaĝus lian komercon).
Eŭropa vojaĝo kun Jeanne 1909-1910
Patro mortis 1913 Rifuzis heredaĵon

Gassy Marin kaj Whiteway

Vizitis Anglion 1914

Rimarkis "Stroud" survoje - Decidis viziti Whiteway - Decidis loĝi tie - Reiris al Belgio
- jam serĉis lokon por eviti militservon

Revenis kun Jeanne

Lasta boato (almenaŭ lasta tago) antaŭ invado de Belgio

Atingis Whiteway -1914 aŭgusto 02

Konstruigis "Lucifer Lodge"

Ne celis la diablon (ne estis religia), sed lumon.

Poste "La Bosketo" (por ne ofendi parencon pastran)

Enloĝis ek de oktobro 04 (sama jaro)

Finfine malliberigita pro militrifuzo

1917 peticio de la infanoj de Whiteway - sukcesis - li revenis

Patrino mortis 1921 - Rifuzis heredaĵon

1921 - Iĝis membro de la Brita Reĝa Antropologia Instituto

[bildo de Lucifer Lodge]



Gassy Marin - Mondvojaĝo

1923 - mortis avino (angla) - Akceptis heredaĵon - malfacile sekvi ĉiujn principojn en kapitalisma mondo

1928 - decidis fari mondvojaĝon - antaŭvidis 3 jarojn - daŭris 10 jarojn

aĉetis biciklon - £3 (~€4)

Jeanne ne kunveturis

Ekiris julio 1928

Revenis julio 1938

Taglibroj

"Randonnée" - 3 volumoj x 340 paĝoj - multaj krajonaj grafikaĵoj - en franca kaj Esperanto

Anoj de la Esperanta Familio

Landoj vizititaj:

Anglio, Belgio, Francio, Svislando, Italio, San Marino, Jugoslavio, Albanio, Grekio, Egiptio, Sudano, Eritreo, Etiopio, Jemeno, Franca Somalio, Brita Somalio, Hindio, Brita Hindio, Portugala Hindio, Cejlono, Kaŝmiro, Burmo, Siamo, Sumatro, Javo, Balio, Majlajo, Hindoĉinio, Kamboĝio, Anamo, Ĉinio, Manĉurio, Japana Koreo, Japanio, Sovet-Unio, Irano, Irako, Sirio, Libio, Palestino, Transjordanio, Turkio, Greklando, Bulgario, Rumanio, Ĉeĥoslovakio, Polio, Aŭstrio, Hungario, Jugoslavio, Italio, Svislando, Liĥtenŝtejno, Belgio, (Anglio).

Transporto

Biciklo (vendis en Aswan) Ŝipo, - Kamelo, - Bov-ĉaro, - Kamiono, - Pet-veturado, - Piede

Anoj de la Esperanta Familio renkontitaj

Wanda Zamenhof, Julio Baghy, Tibor Sekelj, kaj multaj aliaj

Instruis Esperanton en Sudano - ĝis la registaro tion malpermesis

Lingvoj:

Flue - franca, angla, flandra (ĉu nederlanda?), germana, araba, somala, Esperanto

Iomete - hinda, kelkaj aliaj orientaj

Belgio

20-a Internacia Esperanto-kongreso

Svislando

Naturista kolonio (ne en senco de nudista) - D-ro Vester vivas de fruktoj kaj vegetalaĵoj krudaj.

Italio (ekzemple) - malfacila eniro

Somalio - vizo rifuzita (pro anarkiismo)

Jugoslavio - Gassy intervenis en arkeologia saboto (pro nova konstruado) kaj sukcesis limigi la damaĝon.

Tio troviĝas en libreto "Gassy Marin vizitas sian hejmon la mondon" (ne plu akirebla).

Gassy Marin - Enciklopedia Kartaro

Celo

katalogi ĉiun objekton (en la mondo)

laŭ kategorio - sed ofte la celo de iu objekto ne estas evidenta, kaj aŭ la uzoj estis multaj - pripensu ŝraŭbturnilo.
ne finita!

ne trovis kunlaboranton

ĉu praktika?

Gassy Marin - Poste

1948 - Gassy akiris Britan Naciecon (por akiri ŝtat-pension)

Iam apartiĝis de Jeanne sed ne tute

Ambaŭ restis en "La Bosketo" - dividita en sendependaj partoj

Jeanne mortis 1962 oktobro

1969 - Renkontis Esperantistojn de UK, - Ne aliĝis sed loĝis en apuda kampadejo - Inter ili - Hilary Chapman

Gassy Marin - Fino

Jeanne mortis 1962 oktobro

Gassy mortis 1969 septembro 27

"La Bosketo" heredigita al mia onklino - Ne la tereno (kompreneble)

Loĝrajton akiris mia kuzo - Reŝanĝis nomon al "Lucifer Lodge"

Arĥivoj de Gassy en pluraj muzeoj - Kelkaj restas en "Lucifer Lodge"

Fino

Dankojn:

Al **Franciska Toubale** kies intereso pri Whiteway kaj sekva vizito tie stimulis min fari la prelegon, kaj kiu ankaŭ aldonis trafajn kaj utilajn komentojn dume.

Al **Hilary Chapman** kiu sekve de mia voko post tiu vizito de Franciska, mem vizitis kaj trovis hejmojn por multe de la Esperanta materialo de Gassy. Li ankaŭ aldonis trafajn kaj utilajn komentojn dum la prelego.

Arturo Prent

SAT Kongreso Dinano 2014